



MONATO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

REDAKCIO
Paris
27, Boulevard Arago 27
PAUL FRUICHTER
ĉefredaktoro.



ADMINISTRACIO
Szegvár
Hungarujo (Hongrie)
PAUL DE LENGYEL
direktoro.

Ĉiuj klarigoj pri abono, anoncoj, manuskriptoj k. c. estas sur la lasta paĝo.

Eŭropo kaj Ameriko.

Malsana kaj strizita hazo estas ĉi, ke inter Eŭropo kaj Ameriko ĉiam pli kaj pli kreskas kaj kreskas malamikeco pro la konkuraj bezonoj de l' popoloj de unu kaj de l' alia mondparto. Inter la du kontinentoj batalado estas, efektiva «*struggle for life*» sur la kampo de l' politika ekonomio. La Amerika industrio, aga kaj multeprodukta, klopodas por trovi en Eŭropo la vendejojn, kiujn ĝi bezonas de l' tempo, kiam la produktado superis la postulaĵojn de l' tieaj homoj. Kompreneble, la Eŭropaj produktistoj, rekte minacate en siaj bienoj, ne akceptis bonvole la danĝeran konkuradon de industrio pli bone provizita je maŝinoj kaj pli riĉa ol ili: ili komencis kontralistari per ĉiuj eblaj rimedoj, kio kaŭzis plifortigon de l' limdepaga protektistemo. Aliparte la subita kresko de l' Germanaj landoj post ilia unuigo, la paralela disvastigado en Ameriko, Angiolando kaj Germanlando de nova sento, diversa sed la uzataj rimedoj, sed trafema saman celon sub malsamaj nomoj, t. e. la imperiismo, ĉio tio ĉi ankoraŭ pligrandigis la konkurencon inter Eŭropo kaj Ameriko, kaj enjetinte la Eŭropajn

kaj Amerikan homojn en bataladon, kies rezultaton neniu povas nun antaŭdiri, kolektigas ilin vole-nevole sub la standardon de du ĉefaj estroj, kaj kredeble kaŭzos gravegajn ŝanĝojn en la politikaj, ekonomiaj, komercaj kaj industriaj interrilatoj de l' diversaj nacioj de la «Malnova kontinento».

La du homoj, kiuj ŝajnas nun reprezenti unu Amerikan, alia Eŭropon, estas S-ro Pierpont Morgan, kun lia «*Ocean trust*» kaj lia deziro de l' «*Morganising the World*», kaj imperiestro Vilhelmo II-a, kies projekto de «*Eŭropäischer Zollverein*» estas de ĉiuj konata.

Kio estas la «*Ocean trust*»? Tion mi ne bezonas klarigi, ĉar de kelka tempo ĉiuj ajn gazetoj en la mondo priskribis tiun kolosan kontrakton, kunigantan en la mano de kelkaj Amerikanaj bilionuloj grandan parton de la angla komercŝiparo kaj du germanajn ŝipkompaniojn «*Hamburg-America*» kaj «*North German Lloyd*». Oni eble miros, ke la Angloj lasis al Amerikanoj la permeson ordoni gravan parton el ilia ŝiparo, tio ĉi estis preskaŭ ne evitebla kaj devenas de l' malbona situacio de

la diversaj transatlantikaj kompanioj. — Kaj ja, krom la ordinara komercista konkurado, kiu devigas ĉiujn fari gravajn oferojn por tiri al si kaj konservi klientaron de vojaĝantoj kaj ekspedistoj, dum la lastaj jaroj naskiĝis terura malsano, la pasio de l' rapideco, kiu malfermis antaŭ la kapitaloj senfundan kavegon.

Antaŭ dek jaroj estis sur la maro nur ok ŝipoj rapidaj je 20 mejloj. Hodiaŭ ekzistas 58. Ĉia kompanio klopodas posedi ŝipojn plej grandajn, plej rapidajn, plej luksajn. Tiamaniere, oni povas venki nur ruiniĝante.

Jen estas, ekzemple, vaporŝipo servonta inter Liverpool kaj New-York. Ĝi transiros la interspacon per meza irado je dudek mejloj en unu horo.

La utilan ŝarĝon oni kalkulis tiamaniere, ke post ia spaco da tempo, longa sed antaŭvidita, oni estos — dank' al la transportaj enspezoj — retrovinta la koston de l' ŝipo kaj enkasinta profitojn. Bezone estos dek jaroj aŭ plu, sed oni atingos tiun rezultaton.

Sed konkura kompanio ekuzas novan transportilon, kiu estas rapida je dudek unu mejloj, kaj dank' al tiu reklamo, minacas tiri al si la tutan klientaron.

La unua kompanio devos do, por ne konfesi sian malpliecon, tuj ekkonstruigi ŝipon iron-tan almenaŭ egalrapide, se ne ankoraŭ pli rapide.

Sed demandu inĝenierojn: ĉiuj respondos ke por tio oni ne devas nur pligrandigi je unu dudekono la kapablon de l' maŝinoj, oni devas ankaŭ malpligrandigi la larĝecon de l' ŝipo por ricevi maldikan formon pli favoran al la rapida irado, kaj samtempe plivastigi la karbejojn kaj la akvobalastejojn, kiujn oni plenumas iom post iom dum la brulado de l' karbo, por ke la pezo de l' ŝipo restu ĉiam konstanta.

La nova ŝipo estos do pli multekosta, kaj enkasigos malpli da mono.

Sed, apenaŭ oni komencas uzi tiun novan ŝipon, jen estas anoncata la ekzisto de

nova konkuranto 23 mejla. Tuj la inĝenieroj rekomencas novajn projektojn...

Kiel kapitaloj povus sufiĉi!

Antaŭ dudeko da monatoj, la «Kaiser Wilhelm» de la N. C. L. atingis la plej mallongan tempon por la transiro de Atlantiko. Tia faro samtempe metis ĉiujn konkurantojn sur postan vicon, kaj alportis al la Germana kompanio plej bonajn sendaĵojn kaj plej riĉan klientaron.

Ĉu vi kredas tamen, ke ĉiuj ŝipoj de tiu ĉi kompanio havas la kapablon tiel rapide vojaĝi kiel «Kaiser Wilhelm»? Entute ne, sed kio igas la «Lloyd» forta, tio estas ke ĝi posedas unu rapidegan ŝipon. Nun ĝi gajnas monon per siaj mezrapidaj transportiloj, dum la konkurantoj devas fari grandegajn elspezojn, ĝis kiam ili estos la unuaj siavice.

Aliparte, la ĝenerala prezaro de l' transportoj senĉese malpliĝas, ĉar tro multaj ŝipoj ekzistas. En la jaroj 1899, 1900 kaj 1901 la Angloj solaj konstruis ŝipojn po 750000 da kubmetroj en ĉiu jaro. En 1898-a jaro, tiu nombro estis nur 696000 km.; — en 1897 482000 km. Ĉar nune la Sud-Afrika militado finiĝis, granda nombro da ŝipoj uzitaj por la transportado de soldatoj reeniros la komercan servadon, kie pli novaj ŝipoj anstataŭis ilin, kaj pliigos ankaŭ la ruinigajn rezultatojn de l' konkurado.

Tia estis la situacio de la diversaj kompanioj, kiuj faris grandegan negocon, sed elspezante sian rezervkapitalon. (Eĉ unu el plej konataj, kompanio «Cunard», ne disdonis dividrentojn al siaj akciuloj, la lastan jaron.) Jam longe ili estus malaperintaj, se la Ŝtatoj ne helpus ilin mone.

Tial sukcesis la propono de S-ro Pierpont Morgan. Laŭ la kontrakto, la precipaj kompanioj, sin okupantaj pri la transiro de Nordatlantiko, unuiĝas kaj ĉesas konkuradi unu la alian. Ĉiu el ili forpermesas siajn malnovajn ŝipojn kaj konservas nur la plej bonajn; ĉiu el

ili devos deservadi iajn havenojn difinitajn nur por ĝi sola, k. t. p.

La Unuiĝo provos mortigi la memstarajn kompaniojn. (*Allan, Franca Transatl., Neerland-Am. k. a.*) Ĝi faros kontraŭ ili «mortan militadon» (*cut-throat competition*).

S-ro Morgan opinias ke dank' al tiu ĉi kombino, la tuto de l' unuiĝintaj kompanioj ŝparos po 15 milionoj da dolaroj en ĉiu jaro.

Kompreneble, kvankam la Anglaj administracioj restas ŝajne konservataj, tio ĉi estas nur ŝajno, kaj Amerikanoj sin kaŝas post ili, kaj estante ĉiopovaj, sin kaŝos ĝis la tago, kiam plaĉos al ili tute forĵeti la maskon kaj entute preni por si posedon de l' kompanioj.

Ĉu la direktoroj de tiu ĉi sindikato povos ordoni la mondon laŭ sia bonvolo? Mi ne pensas ke jes. La konkurado de la nealiĝintaj kompanioj sufiĉos por malhelpi troan plialtigon de l' transportprezaro.

Aliparte, tro granda malkareco alportus gravajn malprofitojn al la sindikatanoj, kiuj devas trovi multajn elspezojn kaj kapitalojn.

Cetere la memstaraj kompanioj lasos unuvoĉe la konstruadon de l' multekostaj ŝipoj, kaj ricevos pli grandajn profitojn, deservante malpli gravajn liniojn, ol ili havis de la ĝisnunaj luksaj linioj.

Tiamaniere ili povos facile elporti malaltigon de l' transportprezaro.

Tio ĉi estas la historio de la fervojkompanioj, kiuj elspezas por rapidegaj lokomotivoj kaj unuaklasaj vagonoj, la profitojn ricevitajn de la komercajvagonaroj ŝparsisteme trenataj.

* * *

Sed oni allasas ankaŭ al S-ro Morgan alian pli grandegan projekton, kiun mi jam aludis sub la nomo «the Morganising the World». La «Morganigo» de l' mondo, tia estus la revo de tiu ĉi povega movisto de oro kaj de homoj.

La elportado Amerikana alfluas sur Eŭropon. Por certigi al la elportistoj pli bonajn transportkondiĉojn, kaj eĉ ricevi rektan profiton de tiu ĉi transportado, S-ro Morgan volis doni transatlantikan ŝiparon al Ameriko.

Sed plie, kvankam li povas jam ordoni la precipajn fervojojn de Unuiĝitaj Ŝtatoj, oni diras ke liaj agentoj aĉetas je kia ajn prezo la akciojn de l' «Canadian Pacific Railway», tiu longega vojo, kiu interligas Oceanojn Pacifikan kaj Atlantikan tra Kanadlando. Li dezirus posedi poste la marirejon de Vancouver ĝis Japanlando, kaj poste ankaŭ linion de Japanlando ĝis Angllando tra la Sueza kanalo... Tiel ordonante la ĉefajn transportvojojn Nordamerikajn, li povus fari al sia lando la plej bonajn transportkondiĉojn; kaj de l' tago, kiam li konsentus por la produktaĵoj de la Unuiĝitaj Ŝtatoj favoran prezaron, la komercaĵoj kaj cerealoj de Kanadlando, pagante pli altan prezon, malfacile vendiĝus en Eŭropo: la Kanadanoj devus tiam elekti aŭ ruiniĝon aŭ aliĝon al Unuiĝitaj Ŝtatoj... Jam en multaj industrioj Unuiĝitaj Ŝtatoj venke konkuras Anglondon kaj ĝin iom post iom anstataŭas eĉ en London mem. (Rememoru pri la lasta afero de l' tabakoj.) Ĉu ni vidus post pli-malpli longa tempo tiun kuriozan renverson de antaŭa rilato: Angllando fariĝi kolonio de Nordameriko!

(Daŭrigota.)



La kormovoj de ruĝa perdrikido.

Rakontitaj de li mem.

(Daŭrigo kaj fino.)

La maljunulo restis ĉiam egale trankvila. Tre atenta pri la bojado kaj la pafado, ĉiafoje kiam ili proksimiĝis, li signis al mi, kaj ni marŝis iom plu, ekster la vido de la hundoj, bone kaŝitaj per la foliaro.

Tamen unufoje mi kredis ke ni tute pereos. La vojo, kiun ni devis transiri, estis gardata je ĉia fino de embuskinta ĉasisto. Unuflanke, granda fortulo, kun nigraj vangharoj, kiu sonorigis tutan ferajaron je ĉia movo, ponardon, kartoĉujon, pulvujon, kun ankaŭ paro da altaj gamaŝoj, bukumitaj ĝis la genuoj, kiuj lin ankoraŭ pligrandigas; aliflanke malgranda maljunulo, sin apogante kontraŭ arbo, fumis pipon trankvile, palpebrumante, kvazaŭ li volus dormi. Tiu ĉi ne timigis min, sed tiu grandulo...

«Vi nenion komprenas en tio, Ruĝeto,» diris mia kolego ridante; kaj sentime, kun larĝe malvolvitaj flugiloj, li deflugis preskaŭ inter la piedoj de la terura vangharula ĉasisto.

Kaj efektive la malfeliĉa homo estis tiel ĝenata de sia tuta ĉasilaro, tiel okupita sin admiri de l' supro malsupren, ke kiam li ekcelis, ni jam estis neatingeblaj.

Ha! se la ĉasistoj sciis, kiam ili kredas sin solaj en angulo de arbaro, kiom da malgrandaj okuloj fiksaĵoj spionas ilin de post la arbetoj, kiom da pintaj beketoj sin detenas ridi pri ilia mallerteco!

Ni iris, iradis ĉiam. Ne povante fari alie ol sekvi mian maljunan kolegon, mi movigis miajn flugilojn sub la vento de liaj, kaj revolvis ilin tuj kiam li sidiĝis.

Mi vidas ankoraŭ ĉiujn lokojn tra kiuj ni pasis; la herbejo rozkolora pro la erikoj, plena ternestoj de kunikloj sub la flavaj arboj, kun tiu granda kurteno de kverkoj, kie ŝajnis al mi vidi la morton kaŝitan ĉie; la mallarĝa verda

vojeto, kie mia patrino Perdrikino promenigis tiel ofte sian idaron, sub la maja suno, kie ni saltadis, elpikante la ruĝajn formikojn, kiuj kuris sur niajn piedojn, kie ni renkontis fieregajn fazanidojn, kiuj estis pezaj kiel kokidoj, kaj ne volis ludi kun ni.

Mi revidis ĝin kiel en sonĝo, mian mallarĝan vojton, kiam ĝin transiris cervino alta sur siaj maldikaj piedoj, kun okuloj larĝe malfermitaj, kaj tute preta eksalti; ankaŭ la lageton, kien oni venas dekkvinope, tridekope, ĉiuj per la sama flugado, alveninte de l' ebenaĵo unu minute por trinki el l' akvo de la fonto kaj eksaltigi sur sin akvogutojn, kiuj rulas sur la glataj plumoj... Meze de tiu lageteto estis tre dika areto da alnoj; en tiun insuleton ni rifuĝis.

Bezonus ke la hundoj havus eksterordinaran flaradon por serĉi nin tie! Ni kuŝis tie jam de momento, kiam kapreolo alvenis trenante sin per tri piedoj, kaj fluigante ruĝan postsignon sur la muskoj, kie li pasis. Tio estis tiel malgajiga vidaĵo, ke mi kaŝis mian kapon sub la foliojn, sed mi aŭdis la vundulon, kiu trinkis el la lageteto, kaj brue spiris, bruligite de l' febro...

La taglumo malheliĝis. La pafado malproksimiĝis, fariĝis pli malofta. Poste, ĉio ĉesiĝis. Tio estis finita. Tiam ni revenis malrapide al la ebenaĵo, por havi novaĵojn pri nia bando. Pasante antaŭ la dometo de l' arbaro, mi vidis ion teruran. Sur la rando de foso, flavruĝaj leporoj, malgrandaj grizaj kunikloj kun blanka vosto, kuŝis unu apud la alia.

Tie estis malgrandaj manoj kunigitaj de la morto, kiuj ŝajnis peti pri pardono; vualitaj okuloj, kiuj ŝajnis plori; kaj ruĝpiedaj perdrikoj, grizaj perdrikoj, kiuj havis la *ĉevalhufon*, kiel mia kolego, kaj unujaraj junuloj, kiuj kiel mi havis ankoraŭ lanugon sub la plumoj.

Ĉu vi scias ion pli malĝojigan, ol senviva birdo? Tio estas tiel viva, flugiloj! Ilin vidi volvitajn kaj malvarmajn, tio tremetigas...

Granda kapreolo bela kaj kvieta, ŝajnis dormi, kun ĝia malgranda lango rozkolora elirinta el la buŝo, kvazaŭ por leki.

Kaj la ĉasistoj estis tie, klinante sin sur tiu mortigitaron, kalkulante kaj eltirante de siaj ĉasajuloj la sangigitajn piedojn, la ŝiritajn flugilojn, sen respekto al tiuj freŝaj vundoj. La hundoj, kunligitaj por la marŝo, faldis ankoraŭ siajn lipojn, kvazaŭ ili pretiĝus ekkuri denove tra la arbitaĵoj.

Ho! dum la granda suno subiris tie, kaj dum ili ĉiuj foriris lacegaj kun longiĝantaj ombroj sur la teraj pecetoj kaj la vojetoj malsekaj pro la vespera roso, kiel forte mi malamis ilin, homojn kaj bestojn, la tutan bandon!

Nek mia kolego nek mi havis la kuragon ĵeti kiel kutime adiaŭan kanteton al la finiĝanta tago.

Sur nia vojo ni renkontis mizerajn bestojn, kiuj estis faligitaj de okaza plumbero, kaj restis tie, forlasitaj al la formikoj; kampmusojn kun la buŝo plena je polvo, pigojn, hirundojn subite mortigitajn dum la flugado, kuŝante nun sur la dorso kaj streĉante siajn piedetojn ridiĝintaj al la nokto, kiu malsuprenvenis rapide, kiel ĝi faras en la aŭtuno, hela, malvarma kaj malseka.

Sed plej malĝojige el ĉio estis aŭdi je l' fino de l' arbaro, sur la rando de l' herbejo, kaj tie en la salikaro de l' rivero, vokoj malkvietaj, malgajaj, disĵetitaj, al kiuj nenio respondis!

A. Daudet.

El franca lingvo tradukis SAM.



ESTU · BENITA!

(HINDA LEGENDO DE H. SIENKIEWICZ.)

Iam, dum nokto klara, heligita de luna brilo, saĝega kaj granda *Kriŝna* *) ekpensis kaj diris:

— Mi supozis, ke la homo estas la plej bela kreitaĵo sur la tero, sed mi eraris. Jen mi vidas floron de akvolilio, ŝanceliĝantan de nokta venteto. Kiom pli bela ĝi estas ol ĉiaj vivaj estaĵoj: ĝiaj florfolietoj malfermiĝis por rigardi la arĝentan lunbrilon kaj mi ne povas deturni de ĝi miajn okulojn.

— Jes, nenio simila ekzistas inter la homoj, — ripetis li ekĝeminte.

Sed post momento li ekpensis:

— Kial mi, dio, ne kreus per forto de l' vorto ekzistaĵon, kiu estus inter la homoj sama,

*) Hinda supera estaĵo. — Rimarko de l' trad.

kia estas lilio inter la floroj? Ĝi estu por ĝojo de homoj de l' tero. Lilio! akceptu la formon de l' viva virino kaj stariĝu antaŭ mi!

Tuj ondo ekstrems, kvazaŭ de tuŝeto de hirunda flugilo; la nokto fariĝis ankoraŭ pli klara; la lumo pli hele ekbrilis sur la ĉielo; pli laŭte ekkantis la noktaj birdoj, sed tuj ili eksilentis. Kaj sorĉo fariĝis: antaŭ *Kriŝna* ekstaris lilio en homa formo.

Dio *Kriŝna* mem ekmiregis.

— Vi estis la floro de l' lago, — diris li, — estu nun la floro de miaj pensoj kaj paroloj!

La knabino komencis murmureti, sed tiel mallaŭte, kiel bruetis la blankaj liliaj florfolietoj sub la kiso de l' somera venteto.

— Sinjoro! Vi aliformigis min en vivan es-

taĵon; kie do vi ordonas loĝi al mi? Memoru, Sinjoro, ke, kiam mi estis floro, mi tremadis kaj kaŝadis miajn folietojn ĉe ĉiu bloveto de l' vento. Mi timis, Sinjoro, la pluvojn, l' ondegojn; mi timis la tondron, la fulmon, eĉ la sekigantajn sunradiojn. Vi ordonis al mi esti la personigo de lilio; tial mi konservas mian antaŭan naturon: sekve nun mi timas la teron, kaj ĉion sur ĝi troviĝantan... Kie vi ordonos al mi loĝi?

Kriŝna levis siajn saĝegajn okulojn al la steloj, pensis dum minuto kaj fine diris:

— Sur monta supraĵo ĉu deziras vi loĝi?

— Tie estas neĝo kaj glacio, Sinjoro, mi timas.

— Nu, mi konstruos kristalan palacon por vi sur fundo de l' lago.

— En profundo akvara loĝas serpentoj kaj aliaj malbelaj estaĵoj, mi timas ilin.

— Ĉu en la senfinaj stepoj deziras vi loĝi?

— Ho! ventoj teruraj petolas en stepoj, kvazaŭ sovaĝa brutaro.

— Kion do fari kun vi, aliformigita floro?... Ha! En kavernoj de Ellor'o*) loĝas sanktaj ermitoj... ĉu vi estas konsenta loĝi en kaverno, malproksime de l' mondo?

— Estas tie mallumo, mi timas.

Kriŝna sidiĝis sur ŝtonon kaj subapogis la kapon per la manoj. La knabino antaŭ li staris tremanta kaj timigita.

Dume, la ĉielruĝo ekaperis en la ĉielon. Ĉi origis la supraĵon de l' lago, la palmojn kaj la bambuojn. Kvazaŭ ĥoro eksonis ardeoj, grupoj kaj blankaj cignoj el l' akvaro, — kaj pavoj kaj flamengoj en l' arbaro; al ili akompanis sonoj de kordoj, surtiritaj sur perla konko, kun vortoj de homa kanto.

Kriŝna konsciigis de siaj pensoj kaj diris:

— Jen poeziisto Valmiki salutas la sunan levigon.

Baldaŭ etendiĝis tapiŝoj el floroj purpuraj, kaj super la lagon aperis Valmiki.

Ekvidinte la aliformigitan lilion, li ĉesis ludi. La perla ludilo eliĝis el liaj manoj teren, la manoj malleviĝis kaj Valmiki staris senmove, kvazaŭ la granda *Kriŝna* estus aliformiginta lin je arbon.

Dio *Kriŝna* ekĝojis pri tiu ĉi admirego de sia kreitaĵo kaj diris:

— Vekiĝu, Valmiki, kaj ekparolu!

Kaj diris Valmiki:

— Mi amas...

Nur ĉi tiun solan vorton li memoris, kaj sole nur ĉi tiun vorton li povis eldiri.

La vizaĝo de *Kriŝna* subite heliĝis.

— Mirinda knabino! — diris li; — mi trovis la indan por vi lokon sur la tero: eniĝu en koron de poeziisto.

Valmiki do ripetis la duan fojon:

— Mi amas...

La volo de ĉiopova *Kriŝna*, la volo de l' dio ekmovigis la knabinon al la koro de l' poeziisto. *Kriŝna* do faris la koron Valmiki'an klara, kvazaŭ kristalo.

Trankvile, kiel la ondoj de *Ganges*, belega, kvazaŭ somera tago, eniris la knabino en la difinitan al ŝi loĝejon. Sed subite, kiam ŝi pli profunden enrigardis la koron de Valmiki, ŝia vizaĝo paliĝis kaj ekposedis ŝin Timego, kvazaŭ vento malvarma.

Kriŝna ekmiris pri tio.

— Floro vivigita, — demandis li, — ĉu koron de poeziisto vi timas?

— Sinjoro, — respondis la knabino, — kie do vi ordonis al mi loĝi?... Jen, en ĉi tiu koro mi ekvidis supraĵojn de montoj, profundaĵojn de akvoj, plenaj da mirindaj estaĵoj, kaj stepon kun ventoj teruraj,

*) En Hindujo. — Rimarko de l' trad.

kaj mallumajn kavernojn de Ellor'o; tial mi timas denove, Sinjoro.

Sed bona kaj saĝa *Kriŝna* respondis:

— Trankviliĝu, mia floreto. Se en la koro de Valmiki estos neĝo, estu varma ekblovo de l' printempo, sub kies influo ĉi tiu neĝo fluidiĝos; se tie vi trovos senfundan akva-

ron, estu perlo en tiu akvaro; se tie ekzistas dezertaj stepoj, kreskigu sur ili florojn de feliĉo; se estas tie mallumaj kavernoj Ellor'aj, estu la suna radio en la mallumo!

Kaj Valmiki, kiu dum tiu ĉi tempo jam konsciiĝis, aldiris:

— Kaj estu benita!

D. PISKUNOV.



HISPANA ROMANCO.

(EL PUŜKIN.)




JEN MI, INEZILJO,
ĈI-TIEN ALIGIS;
JAM DORMAS SEVILJO,
JEN NOKTO FARIGIS.

SUR STRATO MALLARĜA,
SUB HELA STELARO
MI ESTAS KURAĜA
KUN GLAV' KAJ GITARO.

VI DORMAS . . . ĈESIGOS
LA BONGO PRO L' KANTO;
GRIZUL' SE VENIGOS,
LIN VENKOS L' AMANTO.

POR KIO DO RESTAS
FENESTRO FERMITA ? . . .
SED, EBLE, ĈEESTAS
GAST' IA KAŜITA ?

JEN MI, INEZILJO,
ĈI-TIEN ALIGIS,
JAM DORMAS SEVILJO,
JEN NOKTO FARIGIS.



A. Pjodorov.



La kanto de l' kukolo.

En Britanujo oni kredas, ke feliĉon alportas la aŭdado de kantantaj kukoloj.

Du fratoj laboradis sur kampo. Ekkantas kukolo. Unu el la fratoj diras al la alia:

— Unue mi aŭdis ĝin: ĝi por mi kantis. Mi tuj aĉetos la najbaran domon, kiun mi deziras de longe.

— Ne, — diras la alia, — por mi ĝi kantis. Mi volas vendi mian ĉevalinon, kaj mi estas certa, ke mi ricevos por ĝi multe da mono.

— Sed ne! tio estas por mi. Iru ni ambaŭ al la juĝisto.

Ili iras al la juĝisto kaj diras al li:

— Vi havas grandan spertecon: eltiru nin el nia necerteco. Mia frato diras, ke por li la kukolo kantis; sed mi diras, ke por mi mem.

Longe pripensinte, la juĝisto diras al ili:
— Antaŭe, metu tien ĉi po unu argenta monereto.

Poste, kiam ili estis metintaj siajn monerojn, ĉion enpoŝigis la juĝisto, respondante al ili:

— Vi bone vidas, ke *por mi* kantis la kukolo.

Tradukis Th. Cart kaj M. Pagnier.





Ŝercio

Rakonto de mia amiko . . .

ORIGINALE VERKITA EN LINGVO INTERNACIA.

Kiam mi estis studento ĉe universitato, mia kuzo Rodión Ŝubin estis jam tiea profesoro. Li estis ankoraŭ juna homo kaj fraŭlo, sed malgraŭ lia luksa scienca vivado, malgraŭ lia saĝo, bona karaktero kaj signifa salajro, li neniam havis sukceson ĉe virinoj. Li havis tre malbelan eksterajn entute, kaj krom tio — kelkajn specialajn korpajn difektojn, kiuj tiel ofte ornamas instruitulojn: miopajn okulojn, senharan kapon k. c. En societo li estis mallerta, velka, distrema kaj povis bone paroli nur pri sciencaj objektoj, kiuj preskaŭ neniam estas preparolataj en societo. Oni povas kompreni, kiel virinoj rilatis al li: malbonaj mokis kaj bonaj domaĝis lin, ĉar, laŭ virina konsidero, plej granda malfeliĉo aŭ plej granda kulpo de homo estas lia malbela eksterajo. Kaj eĉ studentinoj de plej altaj virinaj kursoj, kie li ankaŭ profesoris, interesiĝis pri li nur dum li antaŭlegis. Eĉ studentinoj plej seriozaj, plej lernemaj, kiuj adoris lin dum li estis sur katedro, tuj fariĝis tute indiferentaj al li, kiam li finis sian bonegan, elokventan instruan paroladon. Li ĉesis esti talenta profesoro kaj fariĝis malbela viro. Tiam li, kiel kavaliro, tute ne povis konkuri eĉ kun la plej diboĉema, plej malsaĝa studento, havanta ne tre malbelan vizagon. Kaj tamen, li tre amis la virinojn kaj tre ofte enamigadis. Tiam li fariĝis ankoraŭ pli malbela kaj ridinda. Li rimarkis preskaŭ nenion ĉirkaŭantan, ĉiam pensis pri la objekto de sia amo, revis, senkaŭze ridetis kaj entute agis tiel strange, ke la publiko ofte rigardis lin kiel frenezulon. La objekto de lia amo ordinare nenion sciis pri lia enamigo, ĉar li neniam havis kuraĝon eldiri sian senton al la amata virino. Lia senrezultata amo iom post iom malvarmigadis, kaj post kelke da tempo li renkontas alian belan virinon, kiu tuj bruligas novan fajran amon en lia enamigema koro. Kaj tiel senfine. Mia kara kuzo estis preskaŭ ĉiam enamiginta jen multe, jen malmulte. Mi ofte observis lin kaj preskaŭ senerare povis diri, kiam finiĝas lia malnova amo kaj kiam komenciĝas la nova. Ofte mi ŝercis lin, demandante:


— Nu, kara kuzo, en kia grado sin trovas via senĉesa amo, kaj kiu estas la feliĉulino, kiun elektis via eterne-flamanta koro?

La kuzo, ordinare, iom ekkoleras kaj severe diras al mi:

— Lasu viajn malsaĝajn ŝerciojn!

Unufojon, mi tre malice, kaj eble tre malhoneste ŝercis lian enamigemecon. Tio estis tiel. En la plej altaj virinaj kursoj aperis eksterordinare bela studentino, *Hanna Z.* Ŝi estis tiel bela, ke ĉiuj studentoj senescepte enamigis je ŝi. Mi dum tuta mia vivo neniam renkontis tian belan virinon kaj ankaŭ estis iom enamiginta je ŝi, kvankam jam havis tre amatan fianĉinon, kiu poste fariĝis mia edzino. Ekzistas ja tia virina beleco, kiun nenia viro povas rilati indifere. Jen estas, kiel bela estis tiu ĉi nova studentino. Parolante pri ŝi, preskaŭ neniu nomis ŝin laŭ ŝia nomo. Ĉiuj nomis ŝin «*bela studentino*» kaj ĉiuj jam sciis, pri kiu oni parolas. Ĉu vi povas prezenti al vi, kian flamantan amon eksentis mia kuzo en sia koro, kiam li ekvidis la «*belan studentinon*»? Mi pensis ja, ke li nepre frenezigos. Li tute perdis sian instruitan kapon, kaj krom la «*bela studentino*» li rimarkis preskaŭ nenion en la tuta mondo.

En unu belega maja vespero, antaŭ festa tago mi skribis per ŝanĝita mano kaj sendis al mia kuzo la sekvantan leteron:



 PLEJ ESTIMATA SINJOR! PROFESORO!
 MI HUMILE PETAS VIN: VENU MORGAU EN
 LA OKA MATENA HORO EN LA UNIVERSITATAN ĜARDENON.
 MI ATENDOS VIN SUR LA TRIA BENKO DE L' ĈEFA ENIRO. MI
 NECESE BEZONAS VIDI VIN KAJ PAROLI KUN VI PRI TIO, DE
 KIO DEPENDAS LA SORTO DE TUTA MIA VIVO. MI ESPERAS,
 KE VI NE RIFUZAS MIAN PLEJ HUMILAN PETON. VENU.
 KUN GRANDEGA RESPEKTO, SINCERE ALDONITA AL VI

 STUDENTINO HANNA Z.

Mi ne scias, kompreneble, kian impreson faris tiu ĉi letero al mia kara kuzo, sed mi supozas, ke la estiminda profesoro ĝin ricevinte eksaltis almenaŭ je kelkaj futoj pro la malordinara, necesprimebla gojo.

(Daŭrigota.)

M. S. Raktiki.



En la poŝtejo.

De A. Ĉeĥov.

Tiujn ĉi tagojn ni enterigis la junetan edzinon de nia maljuna poŝtestro Dolĉapipro. Enmetinte la belecon en la teron, ni, konforme la morojn de niaj avoj kaj patroj, venis en la poŝtejon por fari la funebran feston.

La flanoj sur la tablon metitaj, la maljuna vidvo maldolĉe ekploris kaj diris:

— Kiaj ruĝaj flanoj! Tutege similaj al la vanĝoj de l' mortinto. Tute same belaj! Tute same!

— Jes, — diris la festintoj, — ŝi efektive estis bela... Virino de l' plej bona speco!

— Jes, ĉiuj miris, ŝin rigardante... Tamen, miaj sinjoroj, mi amis ŝin ne sole pro ŝia beleco, ne sole pro ŝia boneco. Tiuj ĉi du ecoj estas alnaskitaj al la virina naturo ĝenerale, kaj ofte renkontataj en nia mondo. Mi amis ŝin pro alia anima trajto: mi amis ŝin, la mortinton (ke ŝi eniru en la ĉielan regnon!) pro tio ke ŝi, malgraŭ ŝia viveco kaj facilanimeco, restis fidele al ŝia edzo. Ŝi estis fidela al mi, kvankam ŝi havis dudek jarojn, dume mi — baldaŭ mi estos sesdekjarulo! Ŝi estis fidela al mi, al maljunulo.

La diakono, kunmanginta kun ni, elmetis elokventan blekon kaj tuson por esprimi dubon.

— Tiel, vi ne kredas? — demandis la vidvo.

— Mi ne diras tion ĉi, — respondis la diakono embarase, — sed... La junaj virinoj estas en niaj tagoj tiel... frandemaj kaj... spicamaj.

— Vi estas en dubo, sed mi tuj konvinkos vin. Mi subtenis ŝian fidelecon per diversaj pe-roj... kiel ĝin diri?... per strategaj artifikajoj. Mia konduto, mia ruza karaktero sukcese faris ke

mia edzino nenimaniere povis malfideli min. Jes, mi praktikis ruzaĵojn, kiuj konservis mian edze-can honoron. Mi scias specialdirojn! Kaj sufiĉas fari tian diron — kaj finite! mi povas dormi sur ambaŭ oreloj.

— Kio do estas tiuj diroj?

— La plej simplaj! Mi trumpetis en la urbo malbonan famon. Tiun ĉi famon vi tre bone kon-nas. Mi diris al ĉiu: Mia edzino Alena havas ligon kun nia poliestro Ivan Aleksejĉ Zaliĥvakci. Tiuj ĉi vortoj sufiĉis. Neniu arogantis ĉirkaŭ-flirti Alena'n pro timo kolerigi la poliestron. — Ĉiu, kiu renkontis ŝin, forkuris sen pro-krasto, por ke Zaliĥvakci ne suspektus lin. Ha-ha-ha! Vi ja scias! apenaŭ oni havetis aferon kun tiu ĉi anateminda lipharulo, oni tuj malbenus sian vivon: oni havus en unu tago kvin protokolojn pro kontraŭsana stato de la korto; apenaŭ li rimarkus vian katon en la strato, vi tuj havus aferon kun la polico por viaj bestoj vagahtaj sen observo kaj zorgo.

— Sekve via edzino ne estis l' amatino de Ivan Aleksejĉ? — diris mi kun miro de disravo.

— Ne, tio ĉi estis mia ruzajo... Ha-ha! Kion vi diros nun, miaj junuloj?... Ĉu ne lerte mi superruzis vin?

Ĉirkaŭ tri minutoj ni konservis la silenton. Ni sidis kaj silentis, ni sentis ĉagrenon kaj hon-ton por esti tiel lerte trompitaj de tiu ĉi dika kaj ruĝanaza maljunulo.

— Nu, diablo! ci ja reedziĝos! — mur-muris la diakono.

El la rusa tradukis A. Kofman.



TIUJ FLOROJ AMO NIA.

*En gracia eta vazo
Mortas branto de siringo,
Kies flugas bonodoro
Konfuziga kaj dolĉega.*



*De ĝi falis kelkaj floroj,
Kaj sentesa estas falo;
Baldaŭ restos seka, nuda
La velkinta flotrunketo.*



*Tiu parfum' anim' via,
Tiu siring' esper' mia;
Kaj la floroj, kiuj falas
Sekiĝinte, estas amo
Vian koron forlasanta.*

H. RAMIER.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

AKADEMIO DE LA LINGVO NEŬTRALA.

Multaj personoj, kiuj varmege konsentas al la ideo de lingvo neŭtrala, tamen dubas pri ĝia fina venko. Ili demandas: kia estos por la uzantoj de lingvo neŭtrala la aŭtoritato de ĉiuj konfesita? Kia akademio pravigos la kreadon de novaj vortoj? Diferenco en la elparolado estos tiom pli certa, kiom pli da popoloj aliĝos al la nova lingvo. Kie oni povos serĉi gustan elparoladon?

Tiel diras plej seriozaj el niaj kontraŭdirantoj, kaj ni devas rebati *per faktoj* iliajn kontraŭdirojn.

Pri malesto de *konfesita* aŭtoritato oni ne vane plendas. Ni vidu la historion de nia afero. Multaj libroj el nia negranda literaturo enhavas multenombrajn ennovaĵojn kaj la esperantistoj havas nenian kriterion por juĝi, ĉu ili devas uzi tiun aŭ alian ennovaĵon.

Ĉiu numero de niaj gazetoj alportas al ni multon da novaj vortoj, pri kiuj la esperantistoj ne povas scii, ĉu ili devas esti uzataj aŭ ne? ĉu oni devas formi ilin alie? ĉu oni devas fari ilin el aliaj vortoj, kiuj sin trovas en la Universala Vortaro? Kiu ĉi-tion solvos por la esperantistoj? Kiam vortaroj klarigos vortojn nekompreneblajn por multaj esperantistoj?

Kompreneble lingvosciantaj esperantistoj, ĉiu laŭ sia maniero solvados la demandojn pri ennovaĵoj, kaj, aŭ uzos nove renkontitajn formojn, aŭ uzos aliajn, ankoraŭ pli novajn. Sed la lingvo neŭtrala devas servi ne por scienculoj, filologiistoj, por kiuj ĝi ne estas bezona, sed precipe al tiuj personoj, kiuj ne povas uzi alilandajn lingvojn. Por tiuj personoj ĉiu nova vorto povas esti nekomprenebla. Sed novaj vortoj estas uzataj, kiam estas esprimata nova ideo. Sekve apero de novaj vortoj estas fakto ne-

forigebla. Sekve novaj vortoj devas esti komprenigataj al esperantistoj. Ne enpreni ilin en vortarojn estas sendube tre maloportune, ĉar tiam la esperantistoj ne komprenados unu la alian. Sed se verkantoj de lernolibroj kaj vortaroj ilin enmetos, kiu interkonsentigos tiujn diversajn lernolibrojn? Ĉiu ja enmetos en vortarojn vortojn laŭ sia bontrovo. Tiam venos granda dua konstruado de Babelturo.

Oni diros, ke tiam oni nur povas turni sin al nia atestimata d-ro Zamenhof. Sed unue, ĉi-tio ja estas ebla nur tiam, kiam nia literaturo estas tre mikroskopa. Due unu persono *ne povas kaj ne devas* *) esti ĉefo de tutmonda afero. Oni memoru, ke unu homo, kiom ajn li estus talenta, ne povas ampleksi ĉiujn regionojn de scio. Krom ordinara vivo kaj ordinara lingvo estas ankoraŭ scienco pri multaj branĉoj, tekniko kun multenombraj apartaĵoj, kaj komerco kun maso da propraj terminoj. Kiu elektos terminojn por ĉi-tiuj regionoj? Multaj vortoj el specialaj regionoj estos uzataj ĉe ĉiu paŝo en nia ordinara vivo. Kaj se ni vidos necesajn terminojn kreitajn kun plej maldelikata mikso de speco kaj vido, tiam ne sole suferos precizeco de nia lingvo, sed suferos ankaŭ la modesta senco.

Feliĉaj rusoj, posedantaj «Plenan vortaron rusa-internacian» sin trovas en multaj embaraso-
soj en serĉado de vortoj. Speco kaj vido, unu vido kaj alia estas terure miksatataj inter si. Tial ni prave povas demandi kun S-ro Zinovjev: «Ĉu ne venis ankoraŭ la tempo havi bonajn vortarojn nacia-Esperantajn?» (*Lingvo Internacia*, 1901, p. 73.)

*) *Kaj ne volas*. — Vidu artikolon de D-ro Zamenhof, sub titolo «Memstareco» en L. I. 1896, n-ro 6.

Antaŭ nelonge oni en niaj du gazetoj anoncis, ke poezio el ili estas elpelota. Oni malkonfidis al poezio, ĉar ĝi portas kun si liberecon gramatikan. Kiel oni kuraĝas elstrecki poezion post tiam, kiam belaj plumoj de multaj aŭtoroj montris belan poezian stilon en Esperanto? — Kaj ĉu estas nature elŝiri poezion, se ĝi estas ornamo de nia lingvo kaj konstanta luma rebrilo de nia vivo? — Tia stranga okazo fariĝis en sekvo de tio, ke oni pensis por la lingvo, kiu estas parto de la vivo de l' esperantistaro, starigi barilojn. Faru barojn, karaj amikoj, al niaj sentoj de belo al nia amo al poezio, kiujn multaj esperantistoj portas en si. Sed oni ja ne farus tian avizon pri la elpelo de poezio el inter ni esperantistoj, se estus organo, kiu juĝos pri gramatikaj limoj de atencoj de l' poezio.

Unu fojon en nia centra organo D-ro Zamenhof diris, ke esperantistoj en prozo ne devas apostrofi l' artikolon. Sed multaj esperantistoj, eĉ tiuj, kiuj plej ofte turnas sin al l' aŭtoritato de l' aŭtoro de Esperanto, apostrofas l' artikolon. Mi ankaŭ pensas, ke apostrofo ofte beligas prozan parolon, sed kiu do fine aŭtoritate diros, kio estas pli rekomendinda? Unu persono ne povas esti la sola aŭtoritato.

Sur la paĝoj de l' centra organo, oni multe kaj senfrukte disputis pri skribado de nomoj propraj, pri verbigiloj, sed ni havis neniajn rezultatojn, krom dissektiĝo de opinioj malgraŭ tio, ke pri tiuj demandoj D-ro Zamenhof pli eldiris sian opinion.

Antaŭ nelonge oni disputis pri uzado de pronomo «*si*» tiel same senrezultate.

Anstataŭ havi ian kompetentan organon, kiu ellaboradus plej bonajn rimedojn klarigi al praktikantaj paroladon, kiel precize devas esti elparolata tiu aŭ alia sono, oni penas iom post iom ŝanĝi vortojn por elpeli tiajn sonojn, kiuj ne estas bone konataj de tiu aŭ alia nacio. Antaŭ nelonge oni skribis «*ĥroniko*», «*ĥaraktero*», nun oni skribas «*kroniko*», «*karaktero*». Unuj skribas «*teĥniko*», aliaj «*tekniko*» k. t. p.

Ĉiu lingvo, sekve ankaŭ la neŭtrala, evolucias laŭ la leĝoj de la vivo. Lingvo ne povas vivi, ne riĉiĝante per diversaj formoj, ne aliĝante ĉe ĉiu paŝo de sia vivo kaj ĉe ĉiu paŝo ĝi havas emon disfakiĝi en multajn dialektojn pli-malpli diferencajn. Tio sama fariĝas kaj ne povas ne fariĝi en Esperanto. Tralegu diversajn librojn de nia literaturo kaj vi vidos ke la lingvo de ia broŝuro tre diferencas de la lingvo de alia. «Lingvo Internacia» de l' unua periodo tre diferencas de «Lingvo Internacia» de la dua; la lingvo de la «Esperantisto» de tiu de «L' Espérantiste», kaj ankaŭ la lingvo de «L. I.» de la lasta tre diferencas de la lingvo de «L' Espérantiste» de la sama tempo. La stiloj diferencas ne per bagateloj. Montriĝas diversaj diferencoj tre esencaj; ekz. por unu ideo estas dediĉataj diversaj vortoj. En unu gazeto estas uzataj por sama senco tiuj vortoj, kiuj ne estas uzataj en alia.

(Daŭrigota.)

Ivan Seleznióv.



KRONIKO.

El Rusujo.

— S-ro Boris Golubov skribis al ni, ke erare ni citis lin (L. I. 1902, p. 41) kiel aŭtoro de l' artikolo pri Esperanto en «*Orlovskij Vedomosti*». La aŭtoro estas S-ro Piskunov, kaj

S-ro B. G. nur faciligis enpreson de l' dirita artikolo.

Tiun eraron kaŭzis la modesteco de S-ro P. kiu sendis al ni l' artikolon, parolante nur pri S-ro B. G.

— **El Ĥabarovsk.** Dank' al tiea fervora esperantistino S-rino *Massalskij*, estis aranĝita esperanta literaturmuzika vespero (12-an de aprilo n. st.). Oni legis Esperantajn tekstojn kaj versojn. Fr-ino *Strauss* kantis nian Himnon kaj poste kun Fr-inoj *Massalskij* kaj *Smirnov* aliajn muzikaĵojn. Artikoloj, versoj kaj muziko estis parte originalaj, parte prenitaj el presaĵoj. En fino estis legata de du personoj drama peco. Tiu vespero havis grandan sukceson.

S. Poljanskij.

El Holando.

— **La gazetistaro.** En la n-ro 4 de «*Nieuwsbode uit de Ansichtskaartenwereld*» estas loko dediĉita al Esperanto sub la titolo «Gazeto Esperantista.» — Tiesan artikolon verkis S-ro A. H. Kalis.

En aliaj partoj de la sama gazeto estas anoncoj kaj diversaj sciigoj en Esperanto.

— **S-ro Dreves Uitterdijk** sciigis nin pri la ĵusa eliro de l' monata gazeto «*La Holanda Pioniro*» organo de l' *Societo de Holandaj Esperantistoj*. Tiu ĉi gazeto estas propaganda kaj instrua gazeto por Esperanto redaktita en la lingvoj Holanda kaj Esperanto.

Ni estas feliĉaj ke la klopodoj de nia fervora samideano S-ro D. U. sukcesis, kaj ni deziras bonvenon al la nova Societo de Holandaj Esperantistoj kaj al ĝia organo.

Kosto por jaro kun enskribo en la Societon: f. 2.50.

Sin turni al S-ro Dreves Uitterdijk, Trompschool, *Hilversum*.

El Belgujo.

— **S-ro Kapitano Lemaire** faris grandan publikan paroladon por Esperanto (5-an de junio) en la Amfiteatro de Fiziko ĉe la memstara Universitato en Bruxelles.

Sur la invitkartoj estas cititaj kiel patronantoj la sekvantaj societoj: *la Société des Ingénieurs et Industriels, la Société d' Études coloniales, le Cercle Polyglotte de Bruxelles, la Société belge d' Astronomie, le Touring Club de Belgique, l' Extension de l' Ecole normale, l' Institut de bibliographie, la Société belge de Photographie kaj la Société royale de Géographie d' Anvers.*

*

— **Por la Antverpena Ekspozicio**, kie li aranĝis Esperantistan Sekcion, Kapitano *Lemaire* eldonis grandan folion enhavantan leteron por Esperanto de S-ro *Kazy-Girej*, inĝeniero, en la lingvoj Rusa, Franca, Nederlanda-Esperanta, Germana-Angla. Neutile estas laŭdi tiun energian kaj efikan propagandon. Pri la suprenomita letero ni faros nur unu rimarkon: ĉar oni ofte kontraŭdiris al ni ke la kunmetitaj vortoj Esperantaj igas tro longan la elparoladon aŭ la skribadon de la lingvo, ni provis kalkuli la nombron de l' literoj en ĉiu el la tradukoj de l' letero de S-ro *Kazy-Girej*, kaj ni trovis la sekvantan rezultaton: Germana lingvo 4560 lit., — Nederlanda 4400, — Rusa 4320, — Franca 4200, — Angla 3600, — Esperanta 3360.

El Bohemujo kaj Moravujo.

— **La gazetistaro.** En ĉeka gazeto *Pražské Noviny* troviĝas du propagandaj artikoloj pri Esperanto (la 16-an kaj 23-an de februaro) verkitaj de ĝia redaktoro *Xaver Menhard*. — *Moravské Noviny* jam kelkfoje parolis pri Esperanto kaj ĝiaj progresoj, kaj la 3-an de marto alportis propagandan artikoleon de nia sindonema amiko *J. Kajš*. — S-ro redaktoro *K. Pelant* en sia gazeto *Rovnost* propagandas Esperanton per malgrandaj rimarkoj de tempo al tempo publikigataj. Por revuo *Akademie* li verkis longan kaj detalan artikolon pri la ideo de lingvo internacia kaj Esperanto. Du partoj de l' artikolo jam eliris kaj mi atendas ankoraŭ du daŭrigojn. Tiu ĉi artikolo pli malfrue estos eldonita kiel broŝuro. — Gazeto *Nájemník* dediĉis al Esperanto konstantan rubrikon. En la numero de 17-a de majo troviĝas propaganda artikolo de S-ro *Barth*.

Redaktoro de l' gazeto *Nájemník* S-ro *Hanus Vojnar* kun S-ro *Barth* intencas en Prago fondi klubon de esperantistoj. Ni deziras al ilia penado plenajn sukcesojn.

Fine, la marta numero de «Lingvo Internacia» erare raportas, ke la bela artikolo pri Esperanto publikigita en *Národní Listy* (28/1. 1902) devenas el la plumo de S-ro *Čejka*; ĝia aŭtoro estas S-ro *Pechaty*, popola instruisto.

J. Holub.

— S-ro *Toman* sendis al ni novan propagandan poŝtkarton eldonitan de S-ro *Čejka* kaj aliaj Esperantistoj kun teksto en bohema lingvo por sciigi pri Esperanto. Tiu ĉi karto havas presitajn sub la dirita teksto la nomon kaj adreson de l' sendinto.

El Bulgarujo.

— La gazetistaro. Eliris el la prezejo la n-ro 3—4 de *Rondiranto*, organo de Klubo Esperantista «Stelo» en Plovdiv. Tiu ĉi gazeto, redaktata laŭ la maniero preparolita de S-ro *Bavay* en L. I. (1902, n-ro 3), montras ke niaj Bulgaraj amikoj rapide ellernas nian lingvon, dank' al tiu sistemo.

Ni citu el la dirita numero belan rakonton de *I. Malfeliĉulo*, la bone konata de niaj legantoj aŭtoro; poezion de nia fervora kunlaboranto S-ro *Radvan-Ripinski*, kaj multajn aliajn aferojn tre interesajn pri Bulgarujo, propagando k. t. p.

Ĵus eliris la n-ro 5 de *R.*, kiu interalie alportas la portreton de nia fervora samideano S-ro *N. D. Kovaĉev*.

Plie ilustraĵoj alportas scenojn el la Bulgara regiono.

— La revuo «*Svet*» daŭrigas enhavi rubrikon en Esperanto.

— En la n-ro 9-a de la bulgara literatura gazeto «*Laĉ*» (*Radio*) estas presita bona artikolo pri Esperanto de S-ro *Hr. Haralambev*, sub titolo «Lingvo internacia Esperanto».

El Francujo.

— Novaj grupoj. En GRENOBLE, dank' al la nelacebla influo de S-ro *Boirac*, rektoro de l' tiea Universitato, fondiĝis Grupo Esperantista. Prezidanto estas: S-ro *Recoura*, profesoro de ĥemio ĉe la Scienca Fakultato. VP.: S-roj *Allix*, industriisto, kaj *Sentis*, prof. ĉe l' Liceo. S.: S-roj *Aymonier*, prof. ĉe l' Liceo, kaj *Flusin*, preparisto ĉe la Scienca Fak. Kasistobibliotekisto: S-ro *Hoffner*, prep. ĉe l' Sc. Fak.

En Grenoble jam ekzistas ĉirkaŭ centoj da esperantistoj. S-ro *Evrot* komencis la 6-an de junio kurson de Esperanto, post sukcesplena parolado de S-ro *Aymonier*, sub patronado de «*Touring Club de France*» (T. C. F.).

— En LILLE fondiĝis grupo, kies prezidanto estas: S-ro *Damien*, profesoro de fiziko ĉe la Scienca Fakultato. VP.: S-roj *A. Crépy*, industriisto, kaj *Haumant*, prof. ĉe la Literatura Fakultato. S.: S-ro *R. Paillet*, doktoro de sciencoj. K.: S-ro *Pérot*, advokato.

S-ro *Louvet* komencis kurson de Esperanto, kun la helpo de T. C. F., post brila parolado de l' prezidanto de G. E. P. S-ro *Carlo Bourlet*.

Doktoro *Calmette*, direktoro de l' Pasteur'a Instituto en Lille, eltrovinto de serumo kontraŭ la mordo de l' serpentoj, aliĝis la Grupon kun ĉiuj siaj helpantoj. — La Grupo konsistas nun el 120 membroj.

Kiel la Reimsa Grupo, la du suprenomitaj kluboj havas regularon similan al tiu de Grupo Pariza (G. E. P.) t. e.: akceptas membrojn ne estantajn el S. p. p. E., kio permesas tre malaltigi la kotizaĵon.

— Aliaj paroladoj. La tre agema Prezidanto de G. E. P. (Grupo Esp. Pariza) faris paroladon en *Tarbes* (23-an de majo) ĉe l' Societo Akademia. La parolado havis grandan sukceson kaj ni povas esperi ke de nun Esperanto tre rapide kreskos en tiu Pirenea regiono.

— La sama S-ro *C. Bourlet* faris alian paroladon en *Reims* por la justfondita Grupo. Tiu ĉi parolado, anoncita per verdaj afiŝoj en la lingvoj franca kaj esperanta estis farata en la

urbestrara domo, sub la honora prezido de S-ro *Payot*, Akademia inspektoro, kaj efektiva prezido de D-ro *Langlet*, prezidanto de l' Reimsa komitato de la «*Ligue de l' Enseignement*».

La Grupo kalkulas jam pli ol cent kvindek membrojn. Ni citu aparte la *prezidantojn de la Komerca ĉambro*, de l' *Industria Societo*, kaj de l' Reimsa komitato de l' *Franca interligo (Alliance Française)*. Tiu ĉi lasta Societo celas la disvastigon de l' franca lingvo, kaj ne estas malgrava signo vidi unu el ĝiaj prezidantoj aliĝi Esperanton.

*

— **La Komitato de S. p. p. E.**, en sia lasta kunveno, ricevis eksciĝojn de S-roj *René Lemaire*, sekretario, *H. Hamel*, vicprez. kaj *L. Démarrest*, komitatano, kiuj pro la troa grandigo de sia ĉiutaga laborado ne povas plu daŭrigi sian antaŭan oficon. Anstataŭ la suprenomitaj sinjoroj estas elektitaj: vicprez. S-ro *Th. Cart*, profesoro de l' Universitato, — sekr. S-ro *Bréon*; sekve la adreso de l' sekretario de S. p. p. E. estas de nun: *Paris, 10, place de la Bourse, au Touring Club*.

*

— **La gazetistaro.** Enhavis bonajn artikolojn aŭ notizojn favorajn al Esperanto:

Réveil du Dauphiné (17. V. kaj 2. VI), *Petit Parisien* (20. V), *Bien Public de Dijon* (12. V. kaj 2. VI), *Chronique Industrielle* (8. V), *Les Pyrénées* (21. V), *Paix pas le Droit* (majo), *Cri du Quartier* (1. V), *Petit Comtois* (12. V), *Dépêche Républicaine* (12. V), *Union Républicaine* (13. V), *Éclaircur de l' Est* (31. V), *Courrier de la Champagne* (28. V), *Croix de Reims* (28. V), *Spectateur de Vesoul* (18. V), *République de l' Isère* (4. VI), *Maître pratique*, artikolo de S-ro Boirac (25. V), *Petit Journal* (17. V. kaj 10. VI), tiu ĉi gazeto eliras ĉiutage je dekdu cent mil ekz. kaj alportis grandan kvanton da demandleteroj; *Progrès du Nord* (14. VI), *Dépêche de Lille* (13. VI).

— Apartan dankon ni sendas al la gazetoj «*L' Espérantiste*» kaj «*Rondiranto*», *)

*) Abonmonon por «*Rondiranto*» akceptas la Administrato kaj Redaktoro de L. I. (3 fr. 50 por jaro).

kiuj enpresis nian Avizon al komercistoj, — kaj al la Revuo «*l' Educateur*» kiu en sia maja numero tre simpatie analizis la enhavon de unu el niaj numeroj. La redaktoro de tiu ĉi revuo estas malnova Esperantisto, S-ro H. Blanc (en Marsanne, Drôme), kiu uzas ĉiun okazon priparoli Esperanton. Ni ne povas tro rekomendi al ĉiuj personoj, sciantaj la francan lingvon kaj sin interesantaj pri la Edukado legi lian gazeton, kiu enhavas tre utilajn konsilojn miksitajn kun literaturo.

El Hispanujo.

— **Pri la nova tiea gazeto «Esperanto»** la legantoj jam eksciĝis per antaŭa numero de L. I. La dirita gazeto daŭrigis sian eliradon kaj mi kun plezuro vidis ke ĝi fervore subtenas nian aferon, enhavante klarigojn por Hispanoj pri la gramatiko Esperanta, propagandajn artikolojn, k. t. p. Sed tamen unu afero iom ĉagrenis min en la 3-a numero kaj ŝajnas al mi tute malrekomendinda. En *du* artikoloj — flanke de Esperanto — la kvazaŭlingvo Bolaka estas laŭdata, kaj prezentata kiel facile ellernebla!!

Mi ne volas, kiel diris antaŭ kelkaj jaroj D-ro Zamenhof, «similiĝi al Don Kihoto, kiu batalis kontraŭ ventaj mueliloj» *). Tial mi eĉ unu minuton ne provas montri la maltaŭgecon de l' lingvo Blua (aŭ Bolak), kiun povus *paroli* certe ne kvin Bolakistoj en la tuta mondo. (Aliparte D-ro Bollack mem jam forlasis ĉian esperon, laŭ lia propra konfeso.) Kial do propagandi tiun lingvon precize en organo, kies titolo estas «Esperanto»? Ni havu nur unu lingvon internacian aŭ neniun. La natura jam ekzistanta Babela turo sufiĉas ja al ni, kaj nenia bezono estas krei alian artefaritan, flanke de tiu, kiun ni sieĝas — kaj ankoraŭ kun nia Estro, D-ro Zamenhof mi diros **): «*Ĉiujn ami-*

*) «*Esperantisto*» februaro 1893. — «*Novaj lingvoj tutmondaj*» (D-ro Zamenhof).

***) «*Esperantisto*» 1893. En loko citita.

kojn de nia ideo ni petas: ne malfortigu en la publiko konfidon al nia ideo per vanaj fantomoj; memoru ke ĉiu via paŝo, ĉiu via vorto pri nova lingvo subfosas la konfidon de la publiko al nia ideo entute.»

P. F.

— **La gazetistaro.** S-ro *Ricardo Codorniu*, ĉefingeniero de arbaroj, unu el niaj plej fervoraj samideanoj el Hispanlando skribis artikolojn por Esperanto en «*Las Provincias de Levante*» kaj en «*Museo Exposicion*».

El Germanujo.

— **S-ro J. J. Süßmuth** sciigis al ni: *Klubo Esperantista* estis fondita en *Glatz* de S-ro *A. Dinter*. Tiu klubo estas loka klubo de S. I. D. E. — La adreso de l' klubo estas: *A. Dinter, Convict, Glatz; Schlesien (Germ.)*.

Dum lia vojaĝo tra Germanujo, S-ro Süßmuth faris paroladon pri nia lingvo en *Lewin* apud *Glatz*, en la *katholischer Gesellenverein*. Tie nia afero estis ankoraŭ tute nekonata, kaj oni akceptis la paroladon (kiu daŭris preskaŭ unu horon) kun entuziasmo. Ĉeestis ĉirkaŭ 40 personoj. — Pri la parolado skribis la gazeto »*Gebirgsboten*» en *Glatz*, kun malgranda artikolo laŭdanta nian lingvon.

— La S. I. D. E. decidis eldoni germanan vortareton, verkitan de S-ro *S.* La verketo estas jam en presado, kaj kostos 15 centimojn.

— **S-ro Fried**, prezidanto de Societo de pacamantoj en *Berlin* skribis bonegan artikolon por Esperanto en la ilustrita gazeto «*die Woche*» (1-a n-ro de julio).

Tio ĉi estas la unua signo de granda movado por Esperanto, kiu prepariĝas nun en Germanujo. Detalajn sciigojn ni ne alportis ankoraŭ, ĉar la sindonemaj personoj, kiuj sin okupas pri tio, petis mem ke ni silentu dum kelka tempo, ĝis ĉio estos plene aranĝita. Sed la esperantistoj povas de nun *tre* ĝoji: kredeble Esperanto estos baldaŭ tiel konata en Germanujo, kiel estis *Volaptük*.

El Svedujo.

— **La sveda lernolibro.** S-ro *P. Ahlberg* sciigis al ni ke eliris la tria eldono de l' *lernolibro* por Svedoj de S-ro *Paul Nylén*. Tio ĉi permesos al la Esperantista Klubo en *Stockholm* rekomenci la propagandon interrompitan pro manko de lernolibroj.

La lernolibro, 40-paĝa broŝuro, kostas 40 oerojn, kaj enhavas detale klarigitan gramatikon, ekzemplojn kaj ekzercigan parton, faritan el «*Ekzercaro*» de D-ro *Zamenhof* miksitaj kun originalaĵo. Plie la libreto enhavas vortareton, kaj nomaron de nia literaturo kaj de la Esperantaj gazetoj.

— **Kurso.** S-ro *D-ro Krikortz*, vicprezidanto de l' Societo «*Studenter och arbetare*» (studentoj kaj laboristoj) decidigis de tiu ĉi Societo malfermon dum proksima aŭtuno de lingvaj kursoj en la lingvoj Sveda, Germana, Angla, Franca kaj Esperanta. La prezidanto mem de l' Klubo Esp. en *Stockholm* S-ro *Carlsson* konsentis fari la kurson de Esperanto.

— **Plej korajn dankojn** sendas S-roj *Thirlander* kaj *Ahlberg* al la oferemaj kaj fervoraj esperantistoj, kiuj sendis monoferojn por blinduloj kaj modelojn de komercaj leteroj. — Ni baldaŭ raportos pri la rezultatoj akiritaj en tiuj ĉi du entreprenoj. Ni diru nur hodiaŭ, ke la redaktoro de «*Korrespondens*» sciigis S-ron *A.*, ke liaj legantoj grandnombre esperantistiĝis kaj komencas uzi Esperanton en sia korespondado kun li. Ni aparte danku S-ron *A.*, kiu presigis afable nian «*Avizon al komercistoj*» en «*Korrespondens*».

El Hungarujo.

— **Traduko.** En la n-ro 27-a (3. VII) de la ĉiusemajna gazeto «*Tolnamegyel Közlöny*» (eliras en *Szegzárd*) estas presita la Hungara traduko de la rakonto «*La nokto antaŭ la proceso*» (L. I. 1901, n-ro 9-a), — kaj en la veninta n-ro tiu de «*Nerveco*» (L. I. 1901, n-ro 6), trad. de S-ro *Paul de Lengyel*, kiu notis de ambaŭ verko, ke ĝi estas tradukita el la lingvo Esperanto.

El Italujo.

— **Doktoro Marignoni** en sia broŝuro pri stenografio **Vegezzi** rememorigas la legantojn pri nia lingvo.

— En «*La Domenica del Corriere*» estis artikolo por Esperanto verkita de nekonata aŭtoro. (Eble de S-ro *Picchi*?)

El Sudameriko.

— **D-ro Villareal** presigis longan artikolon en «*Almanaque de el Comercio*» (Lima) kaj daŭrigas la Hispanan tradukon de *Ekzercaro* en «*Revista de Ciencias*».

— **S-ro A. Caetano Coutinho** skribis artikolon en la gazeto «*O Comercio de Minas*».

El Kanadlando.

— **Virina Klubo Esperantista** fondiĝis en Montreal, kun la helpo de l' tie jam ekzistanta klubo «*Progreso*». Prezidantino estas S-rino *Th. Leymarie* (Parizano de la Lumo). VP. Fr-ino *A. Trottier*. Sekretariino: S-rino *A. Saint Martin*. Kasistino: Fr-ino *Filion*. La klubo akceptas membrinojn eksterkanadajn. Sin turni al la prezidantino, 137, S^{te} Elisabeth, *Montreal*.

Jen fondiĝis la unua klubo de Sinjorinoj Esperantistaj, ĉia komentario nia estus neutila. Nur ni povas diri unu aferon: La Eŭropaj virinoj baldaŭ imitu la Amerikanajn, al kiuj longan sukceson ni deziras.

— **Paroladojn, kursojn kaj artikolojn** ĉiam daŭrigas fari en Kanadlando niaj fervoraj samideanoj S-roj *Beauchemin*, *St. Martin*, *Leymarie*, *Larose*, *Bourgeois*, k. a. Tro longe estus raporti detale pri ilia efika agado; cetere *La Lumo* speciale sin okupas pri tio, kaj tiuj el niaj legantoj deziras prisciĝi, trovos ĉiujn ajn informojn en tiu ĉi gazeto.

— «*La Lumo*» En la n-ro 5-a de «*La Lumo*», la tre interesa organo trilingva de l' Kanadanoj Esperantistaj, estas tre afabla notizo pri L. I. kun varma rekomendo, por kiu ni kore dankas la simpatiajn redaktorojn. Ni rememorigu niajn legantojn ke la redaktoro de

L. I. akceptas abonmonon por «*La Lumo*» (3 frankoj por unu jaro). Enhavante tekstojn en la franca kaj angla lingvoj flanke de Esperanto, tiu revuo povas esti bonega propagandilo.

— En la lasta (juna) n-ro de «*La Lumo*» ni legis ke «S-ro *Leymarie* eksigis la *Montrealan* klubon kaj la gazeton; sekve ĉio rilata al «*La Lumo*» devas esti adresita al: «*La Lumo*», 79 *St. Christophe, Montreal*».

En la sama numero estis nia «*Avizo al komercistoj*» kune kun afabla komentario. Koran nian dankon al la Redakcio!

— **Esperanto en fonografo.** La Klubo *Montreala* sendis al D-ro *Zamenhof* fonografon, kun la peto ke li elparolu diversajn tekstojn antaŭ la aparato. La celo estas ricevi estontan modelon de tute perfekta Esperanta elparolado.

LETERO DE DOKTORO ZAMENHOF

PRI LA LANDNOMOJ.

Grava malfacilaĵo de Esperanto por eklernintoj kaj personoj ne havantaj sufiĉe da tempo por ellerni la lingvon estas la neĝenerala maniero traduki la nomojn de ŝtatoj per la sufikso «*uj*». Por kelkaj landoj, oni diras *Anglujo*, *Germanujo*, *Rusujo*, por aliaj *Holando*, *Finlando*, *Grenlando*, por aliaj ankoraŭ *Kanado*, *Peruo*, *Ĉilio*, k. t. p.

Ekzistas alia maniero uzi ĝeneralan sufikson, kies senco estas de ĉiuj konata, sekvante la regulojn donitajn de D-ro *Zamenhof* por la kunmetado de l' vortoj: sufiĉas por tio ligi la vorton «*lando*» al la radiko de l' ŝtatnomo. Ekzemple, ni diros: *Ruslando*, *Kanadlando*, *Angllando*, *Germanlando*, k. t. p. Tiamaniere oni ĉiam scias klare ke oni parolas pri lando kaj ne pri loĝanto en ia lando, kaj la ĝeneraluzebleco de tiu formo forigas la erarojn riceveblajn de l' uzado de «*uj*». (Unuj skribas erare *Franco* anstataŭ *Francujo*, kaj *Peruujo*, *Holandujo*, *Aŭstralujo* ... aliaj uzas *Francano*, *Francajano* k. t. p.)

Aliparte, tiu formo estas tre ofte uzata en la lingvoj Angla, Germana, Skandinava, Franca, k. t. p.

Ekz. *Angle*: England, Finland, Friesland, Gothland, Greenland, Guelderland, Holland, Holy Land, Scotland, Iceland, Newfoundland, k. t. p.

Germane: England, Deutschland, Finnland, Friesland, Grönland, Gothland, Neufundland, k. t. p.

France: lande, Finlande, Irlande, Néerlande, Maryland, Zoulouland; — *Terre de Feu, Terre Neuve*, k. t. p.

Ĝi estas do pli facile komprenata kaj uzata de l' homoj sciantaj unu el tiuj lingvoj.

Kompreneble mi ne volas diri ke nur tiu formo «lando» devas esti uzata de ĉiuj, la formo «ujo» estas ĉiam uzebla flanke de alia formo. Ni nur rekomendu egale la du formojn al niaj instruatoj, kiel ni diras «pomarbo» kaj «pomujo», «pentrarto» kaj «pentrado», k. t. p. La homoj uzos senkonscie la formon kiu ŝajnos al ili pli ĝeneralan, pli oportunan kaj pli klaran, kaj l' alia formo iom post iom malaperos el nia lingvo.

Mi jam rimarkis, ke en diversaj kursoj de Esperanto, la lernantoj multe pli volonte akceptas kaj pli faĉile memoras la formon «lando» ol la formon «ujo».

Sed ĉar mi ne volis, eble malprave, uzi novan formon sen aprobo de l' aŭtoro de Esperanto, mi skribis al S-ro D-ro Zamenhof, kiu havis afablecon respondi al mi per la sekvanta letero:

Kara Sinjoro,

Via opinio pri la nomoj geografiaj estas tute ĵusta, kaj vian ideon pri la uzado de la aldono «lando» mi plene aprobas. Laŭ la reguloj de Esperanto oni povas tute bone diri Franclando, Angllando, Kanadlando, Perlando, k. t. p.

Via

L. Zamenhof.

Mi do esperas, ke, de nun, miaj kolegoj, gazetoj Esperantistaj bonvolos alporti tiun sciigon al siaj legantoj, kaj ke S-roj verkistoj de lernolibroj ankaŭ citos la formon «lando» apud la formon «ujo» por la traduko de l' nomoj de ŝtatoj.

Paris, 18-an de junio 1902.

Paul Fruictier.

BIBLIOGRAFIO.

Mezinárodní řeč Esperanto pro samouky. Sepsal Fr. Vymazal. — Nákladem Emila Solce v Telči.

En decembro 1901 eliris en Moravujo nova ĉeĥa lernolibro de Esperanto, kiu estos laŭ mia modesta opinio prospera populara libreto, tre utila por memlernantoj, precipe por tiuj, kiuj ne aŭ malmulte konas la fundamenton gramatikan. Nia pli frue eldonita ĉeĥa lernolibro estas malfacila por tiaj personoj, sed ne la verko de S-ro Vymazal, kiu ne postulas la scion de gramatiko.

Post mallonga enkonduko li klarigas la signifon de finiĝoj *o* kaj *a* je apartaj vortoj plej ofte uzataj en kutimaj interparoloj, kaj tuj konstruante frazojn iom post iom facile klarigas la tutan gramatikon. Sekvantaj ekzercoj konsistas el fabloj kaj komencaj versoj de Biblio (kiel en la pli frue eldonita lernolibro), leteroj el verko n-ro 86 kaj el «Manuel Complet» de S-ro de Beaufront.

Nur unu afero ne plene kontentigas min. Sur la 18-a paĝo li klarigas particon pasivan kaj ĉe fino diras: «Ili estas nur pli aŭ malpli ludoj. Sufiĉus, kiel alie, la sola finiĝo *ata*».

La vortoj «kiel alie» eble rilatas al la participo aktiva. La *ita, ota, inta, onta* do laŭ lia opinio estas superflujaj. Unue, lernolibro ne estas oportuna loko por kritiki la lingvon pri kiu ĝi instruas. Due, se ni konservus nur *at* kaj *ant*, Esperanto estus tro malriĉa je nuancoj de apartaj vortoj necesaj pro ĝusta kompreno. Kaj trie, ĉu Esperanto efektive tiam estus ankoraŭ pli facile elernebla ol ĝi jam nun estas? Certe ne; ĉar la funkcio de *a, i, o* en finiĝoj de verboj estas de ĉiu lernanto de Esperanto jam konata el *as, is, os*; ni do al la memoro ne malgrandigus la jam nun tiel malgrandan ŝarĝon.

Cetero mi opinias, ke la citita rimarko de S-ro Vymazal kaŭzos nenian malutilon al nia afero.

La verko enhavas nenian vortaron, estas 41-paĝa kaj kostas 50 helerojn.

Mi povas aldoni, ke S-ro Vymazal estas verkisto en nia lando tre bone konata. Krom aliaj, de li devenas multaj popularaj lernolibroj pri plej diversaj lingvoj.

J. Holub.

LOUČKA (P. NOVY-JIČÍN), MORAVUJO.

Sciigo de l' redakcio.

Pro manko de internacia poŝtsigno la Esperantistoj estas tre embarasataj, kiam ili deziras sendi monon en landon kie ne ekzistas internaciaj poŝtomandatoj, aŭ malgrandajn sumojn alilanden, aŭ kiam ili volas sendi al alilanda korespondanto poŝtmarkon por respondo.

Tiun ĉi mankon ni povas kiel eble forigi, kaj ni aranĝas en la nuna tempo specialan oficejon en la redakcio de l' gazeto, kie ni tenos neuzitajn poŝtmarkojn de kiuj ajn landoj je l' dispono de esperantistoj.

Tiamaniere do niaj legantoj povos aĉeti de ni la fremdajn poŝtmarkojn, kiujn ili bezonos. Tiujn poŝtmarkojn ni vendos kiel eble plej malkare, prefere kontraŭ papermono. Por la malgrandaj sumoj ni akceptos ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn por la 3/4 de ilia valoro, laŭ la kutimo. Detalan prezaron kaj regularon ni publikigos en nia venonta numero. Ĉiujn mendojn kaj leterojn oni devos sendi al la redaktoro de L. I.

PROPAGANDO.

En Holando naskiĝis nova organo kiu celas fariĝi ligilo internacia por ĉiuj amantoj de poŝtkartoj kun vidaĵoj. La gazeto estos de nun precipe servanto de Esperanta propagando, enmetonte diverslingvajn artikolojn kun la traduko Esperanta apude.

La redaktoro estas S-ro A. H. Kalis, antaŭa Volapükisto, kiu tiom kavalire oferis multjaran laboron

kaj amikecon sur l' altaro de Esperanto kaj fidele helpas nin ĉiam pli.

Li estas devigita altigi sian gazeton malgraŭ la grava konkurenco de simila holanda organo kaj tial serĉas helpon kaj apogadon inter la Esperanta frataro. Multaj do atentu tiun ĉi entreprenon kaj legu la regularon, kies kondiĉoj estas vere tre kontentigaj.

La ekzistado de lia gazeto kaj parte ankaŭ la rapida florado de Esperanto en Holando dependas de tio.

(HILVERSUM.)

Dreves Uitterdijk.

Societo internacia «Ansicht» por kolektantoj de ilustritaj poŝtkartoj (lokita en Rotterdam, Holando).

—o— REGULARO. —o—

La societo estas nomata: «Ansicht», Societo Internacia de Vidokartkolektantoj kaj estas lokita en Rotterdam. Ĝia celo estas: ekestigi amikajn interŝanĝojn inter kolektantoj ĉiulandaj kaj progresigi la kolektadon de ilustritaj poŝtkartoj tra la tuta mondo.

Jarpago por membroj estas 1.25 guld. enlande kaj 3.25 frankoj eksterlande.

Ĉiu membro ricevas senpage: 1-e, membrokarton; 2-e, stampilon; 3-e, la gazeton «Ilustrita Poŝtkarto»; 4-e, ekzempleron de l' konata lumiga vidokarto «la groto de Kaprio»; 5-e, 4 senpagajn anoncojn en la nomaro de l' kolektantoj; 6-e, rabaton 25% por ĉiuj anoncoj en la «Nieuwsbode» (il. Poŝtk.); 7-e, gravajn premiojn kiam oni alportos novajn membrojn.

Kiu deziras aliĝi, tiu devas sendi la membropagon al la direktoro de l' societo: S-ro J. Mighorst jr., Esperantisto, Rottshaat 22, Rotterdam, kiu post ricevo de l' poŝta mandato sendos membrokarton, k. c.

Fiksado sekvas per enmeto en la nomaron de l' sekvanta n-ro de «Nieuwsbode». Ĉiu membro havas la devon respondi karton senditan al li dum la daŭro de 14 tagoj. Se oni ne plenumos tiun kondiĉon, la forsendinto sin adresos al la direktoro, kiu en «Nieuwsbode» trifoje admonos la nefarinton sendi sian respondon karton, kaj fine eksmembrigos lin.

Ni ricevis la sekvantan leteron:

Tre estimata Sinjoro!

Mi permesas al mi skribi al vi, por ke vi min helpu en la propaganda movado kiun mi intencas fari pri Esperanto en la medicinaj societoj kaj gazetoj Brukselaj. Mi opinias, ke por pli certe trafi la celon, estas tre utile kolekti kiel eble plej multe da dokumentoj pri ia temo medicina aŭ hirurgia elvenintaj de kuracistoj — eĉ de ia persono — logantaj en landoj, kies lingvo estas nefranca, kaj ĉefe en landoj malproksimaj, kies lingvoj de miaj samlandanoj malmulte aŭ tute ne konataj. Tial mi pensas utile adresi alvokon al la tuta Esperantistaro per via gazeto L. I.

Mi tuj ĉiam respondos al miaj korespondontoj sur ilustrita poŝtkarto, kaj mi esperas, ke grandnombre mi ricevos sendaĵojn presindajn en medicinaj kaj sciencaj gazetoj. — — — — —

Ricevu k.t.p.

HENRI MINEUR, doktoro de medicino.
97, rue de la Victoire, — en Bruxelles.



DIVERSAĴOJ.

Respondo al S-ro Radvan-Ripinski.

En la n-ro 3 (75) de L. I. estis presita artikolo «Esperantista idaro», en kiu S-ro R.-R. skribas, ke ni, esperantistoj, «flankigas de nia propaganda laboro niajn fidelajn estontajn apostolojn, niajn infanojn.» Al mi ŝajnas, ke li eraras, ĉar — jen, ekzemple, mi havas du filinojn: unu 3 1/2 jara, kaj la dua 2 jara, kiujn mi instruas pri nia lingvo. La pli granda, Mario, scias ĉirkaŭ 100 vortojn en Esperanto, el kiuj antaŭe, kiam ŝi ne sciis eĉ unu vorton de sia patra (rusa) lingvo, sciis tamen vortojn Esperantajn *akvo, pano* kaj *ĉevalo*. La dua, Veroniko, nun scias multajn vortojn de nia kara lingvo. Krom tio, Mario nun scias Esperante la preĝon «Patro nia» kaj preĝas nur je ĝi. Kaj mi estas konvinkita, ke estas ankoraŭ multaj aliaj esperantistoj, kiuj faras similon rilate al siaj idoj.

Estus tre utile malfermi en nia gazeto apartaĵon pri tiu ĉi demando.

T. Ščavinsky.

OPINIOJ.

PRI NOVA RADIKVORTO «urg».

Al S-ro Paul de Lengyel, admin. de L. I., Szegvár.

Atestimata Samideano,

Korektante la vorton «urgenta», kiun mi uzis en «Publika respondo al S-ro Johano Fréhis» (70—71-a n-ro de L. I.) per «necesega», vi ne estis prava, nek mi ankaŭ, ĉar mi devis uzi «urĝa».

Ja, france, *urgent* signifas: «kio postulas rapidon», «kion oni bezonas en la malplej longa tempo». «Necesega» povas esti tradukita france kaj angle per *indispensable*, germane per *unentbehrlich*; t. e. kio estas nepre necesa, tutege necesa (ekz. la koro estas necesega por homo), sed tiu ĉi termino enhavas nenian ideon pri rapideco. La sekvanta frazo donas ekzemplon pri tio: «Post unu jaro, mia laborejo estos finita, kaj, tiam, movilo estos necesega por miaj laboriloj, nun ĝi ne estas necesega por mi, nek ankaŭ post dekunu monatoj, sed, tiam, ĝi *urĝos* (t. e. estos necese ĝin tuj ekhavi), se ĝi ne estas ankoraŭ liverita.» — Mi pensas tiun ĉi ekzemplon sufiĉe kompreniga.

Kiam mi plendis pri la malesto de tia vorto, pro neplenaj vortaroj, ni ne ankoraŭ ricevis la «Esperanto-Franca Vortaron», sed nun ni ne estas plibone helpataj, ĉar ĝi ne enhavas tiun ĉi vorton. Mi do opinias ke taŭgus elekti radikon por eldiri tiun ĉi ideon, ĉiam respektante la principon konforme je kiu nia estimata Estro, S-ro L. Zamenhof, kombinis nian lingvon, la principon de internacieco. Tial mi proponus la radikon «urĝ», kiun oni uzas en la sekvantaj lingvoj:

latine	<i>urgere</i> ,
itale	<i>urgere</i> (urĝere),
hispane	<i>urgir</i> (urĝir)
france	<i>urgent</i> , <i>urgement</i> , (ĉe antikva franca lingvo <i>urget</i> [urĝe]),
angle	<i>to urge</i> (ŭĝ), <i>urgent</i> , <i>urgently</i> , k. a.

Tiu ĉi vorto ŝajnas al mi sufiĉe internacia kaj grandbezona por ke ĝi estu akceptita de l' esperantistaro.